# Informilo

Monata revuo
Maandelijks tijdschrift

10a jarkolekto n-ro 1
januaro 1990

## Estraro

Monique Caestecker, prezidanto, Kerkstraat 66, 9940 Sleidinge, ☎ (091) 57 63 84.
Edward Symoens, vicprezidanto, Putsesteenweg 131A, 2180 Kalmthout, ☎ (03) 666 62 66.
Ivo Durwael, sekretario, Paul Gilsonlaan 5, 2520 Edegem, ☎ (03) 440 30 92.
Roland Rotsaert, financoj, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge, ☎ (050) 33 00 04.
Alex Humet, instruado, van Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem, ☎ (03) 239 21 69.
Jos Vandebergh, eksteraj rilatoj, Ambachtstraat 39, 3538 Houthalen, ☎ (011) 52 19 43.

## Komisiitoj

*Financoj:* Roland Rotsaert, Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts.
*Eldonoj:* Alex Humet, Paul Peeraerts kaj Chris Declerck (Amerikalei 135/2, 2000 Antwerpen)
*Manlibro de la aktivulo:* Marc vanden Bempt (Duisburgsestraat 12, 3030 Heverlee, ☎ (016) 20 14 53.
*Gazetara servo:* Guido van Damme (FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, ☎ (03) 234 34 00).
*Rebata servo:* Germain Pirlot (Kemmelbergstraat 5/3, 8400 Oostende, ☎ (059) 70 87 00).
*Prelegvojaĝoj:* Hilde van Ingelgem (Arbeidsstraat 21, 9300 Aalst, ☎ (053) 70 50 11).

## Estrarkunsido 90 01 13

1. **Ĉeestas**: Ivo Durwael, Roland Rotsaert, Paul Peeraerts, Alex Humet kaj Jos Vandebergh.
Petis senkulpigon Edward Symoens.

2. **MONATO**: Stefan Maul jam havas sian telekopiilon kaj baldaŭ oni instalos duan telefonlinion ĉe li kaj en la oficejo de FEL. La decembra numero konis grandan prokraston pro malsanoj kaj troŝarĝiteco. La januara supozeble povos aperi kun malpli da malfruo. Maul akceptis, ke FEL mem transprenas la redaktadon de ĉ. unu triono de la revuo, por plirapidigi la produktoprocezon. La redukto de la salajro de Maul kaj lia laborkontrakto estu ankoraŭ priparolataj.

3. **Strategio**: Konstatante, ke la laborplano de FEL grandparte realiĝis aŭ estas realiĝanta, la estraro cerbumis pri la farto de la Ligo. Tro multe da atento, certe fare de la oficejo, iras al grafikaj laboroj kaj maltro al la esperantigo en Flandrio kaj al la apogo de la grupoj. ID plupenetros en la studadon kaj la estraro rekaptos la temon en februaro.

4. **Antaŭa protokolo**: Akceptita.

5. **Venontaj kunvenoj**: La 17an de februaro anstataŭ la 10a.

6. **Kontaktoj kun la bazo**: Surbaze de la priparoloj kaj de letero de Marc vanden Bempt, ID reverkos la demandaron kaj antaŭmetos ĝin dum la venonta estrara kunveno.

7. **Manlibro**: Konstatinte ke multaj gvidaj personoj el la movado ne posedas la *Manlibro por la Esperanto-aktivulo*, la estraro decidas, ke la grupoj de FEL kiuj ne posedas ĝin, ricevos ĝin estonte aŭtomate kaj senpage. Tiuj kiuj jes posedas ĝin, pluricevos la paĝojn aŭtomate kaj senpage post elĉerpiĝo de sia bonhavo. Ankaŭ la estraranoj de FEL ricevu la libron senpete.

8. **Esperanto-centroj**: Spomenka Stimec ne jam respondis nian ĉi-teman leteron.

9. **Jarkunveno**: La ĝenerala jarkunveno de FEL okazos la 10an de marto en la estejo, Frankrijklei 140, Antwerpen. Antaŭ ĝi okazos, samkiel pasintjare, prezentado de la funkciado de la centro. Ĉiuj membroj estas bonvenaj por viziti la presejon, kompostejon, libroservon ktp. inter la 13a kaj 15a horo. Por neesperantistaj familianoj oni intencas, kune kun la loka grupo, okazigi iun urbviziton.

La jarkunveno komenciĝos je la 15a horo kun la jena programo:

- Financaj rezultoj de la jaro 1989
- Buĝeto por 1990
- Sekretaria raporto 1989
- Elekto de administrantoj, estraranoj, prezidanto
- Tempo por demandi, peti, laŭdi, protesti k.s.

10. ***Esperanto-Panorama***: La estraro rimarkis kun kontento la plibonigon enhavan de la revuo. Ĝi tamen bedaŭras ke la ekstero restas tro simpla. Pri la enpaĝigo oni riproĉas ke mankas klara indiko pri fino de la artikoloj, ke piednotoj troviĝas sur la ĝusta paĝo, ktp.

11. ***Esperanto-Panorama* por blinduloj**: Pro la altaj kostoj FEL rezignas pri la eldonado de surkaseda versio de la revueto.

12. **Kubo**: El la okcidento nenio nova.

13. **Memoriga listo por bud-prizorgantoj**: PP ne jam faris la promesitan liston.

14. **Faldfolio Green**: PP faros prezotakson ĝis la venonta kunveno.

15. ***Freŝe gazetaren***: La unuan de marto FEL havos budon en la borso „Vers voor de pers" (fakborso por librovendistoj). PP prizorgu ĝis tiam katalogeton pri la FEL-eldonaĵoj. ID ĝustatempe memorigos lin pri tio.

16. **Aranĝoj**:

- La Limburga tago okazos la 18an de aŭgusto. Loko fiksota.
- Ĉi-jare la grupo de Kortrijk ne okazigos la semajnon de internacia amikeco, pro aliaj aranĝoj.
- Instrutagoj: vidu la aliĝilon en tiu ĉi numero.

**<E> La grupo de Lokeren „La krokodiletoj" invitas ĉiujn al sia unua Zamenhoffesto je sabato, la 27a de januaro, inter 15.30 kaj 19h. Informojn donas Petro de Smedt, Hemelstraat 44, 9330 Dendermonde. Prezo (inkluzive varman manĝon) 200 fr. (infanoj) aŭ 500 fr. (malinfanoj).**

**Estrarkunsido de FLEJA je 17/12/89 ĉe Patrick Haerick en Wondelgem**

Ĉeestantoj: An Alberto, Patrick Haerick, André Ruysschaert, Vera Van Boxel, Eddy Van den Bosch, Jean Pierre VandenDaele kaj Jean-Christophe Somer (por JEVA).

Senkulpigis: Stefaan Cottenier

Komenco: 10h15.

1. Enkonduko
La antaŭa protokolo estis akceptita.

2. Financoj
La poŝtoĉeka konto nun estas enordigita tiel ke Eddy nun rajtas pagi aŭ deponi monon sur ĝi. La numero restas kiel 000-0035520-18. La ŝuldita mono de GEJ (por germanaj partoprenintoj en FLEJA-renkontiĝo) kaj Zagrebo (IJK-interŝanĝo) estis finfine pagitaj. Tiu ĉi sumo povos kovri la malgajnon de nia lasta semajnfina renkontiĝo.
FLEJA pagis la restadkostojn (2300 BEF) de Kelchterhoef kiel propaganda elspezo.
Kotizoj por JEN kaj Koncize estu 200 BEF ek de 1991, decidota dum nia ĝenerala jarkunveno.

3. 12a semajnfino en Lokeren (Eddy)
Pro la malmulta nombro da partoprenantoj (42 da) ni devis krompagi por la manĝaĵoj kaj tranoktado. Kaŭzoj povas esti la nekutima dato kaj malpli da partoprenintoj el Nederlando pro organizo de IJK tie. Ankaŭ necesas de antaŭe dividi taskojn ĉar unuopulo ne povas fari ĉion. La flandra komunumo malakceptis subvencii nian semajnfinon pro tute stranga kialo malklara. Eble pro simpla manko de mono ? Eddy informiĝos. Tiel ni havas malgajnon de ĉirkaŭ 12000 BEF. André esploros havigi subvenciojn de "Jeugd en Europa" sed ne tute klaras ĉu tiu ĉi organizo ankoraŭ ekzistas.

4. la JEVA-kongreso
Ĉirkaŭ la unua de novembro okazos la unua semajnfino valona de JEVA en kunlaboro kun FLEJA. Same kiel ni spertis jam, estas problemo trovi kongresejon taŭga por cento da partoprenantoj kun subvencieblaco de la valona komunumo. Principe ni povos kontribui al tiu ĉi semajnfino.

5. Estontaj kongresoj kun partopreno de FLEJA-membroj
23-25/2/90: skipromena semajnfino en Eupen
30/3-1/4/90: JEVA-kursosemajnfino por gejunuloj en Hastière-Lavaux (muelejo de l'Hermeton)
13-16/4/90: paska NEJ-renkontiĝo

6. Diversaĵoj
6.1 Zonumi (Gordelen) estis tre agrabla por la partoprenantoj, propagandcele ĝia efiko estis malpli granda pro malgranda nombro nia. Sekvontjare ripetota, tiel ke Eddy denove pagos por deko da partoprenantoj.
6.2 Pasporta Servo: de la eldonota informilo ni mendis 500 ekzemplerojn. Pri ĝia aspekto Eddy esploros dum la IS. Por mencio en Interrail ni atendas la finpretigon de la faldfolio por ke ni povu sendi ekzempleron al Interrail.
6.3 Paska renkontiĝo de IEJ: ne eblas ĝui vojaĝsubvenciojn pro nerekoniteco de FLEJA de la flandra komunumo.
6.4 Lingvoborso brusela Inforjeunes pri feriaj eblecoj. Serĉataj estas kunlaborantoj nederlandlingvaj (prefere FLEJA-anoj). Eblas financa kompenso al JEVA.
6.3 Leterpapero: de ĝi ni disponas pri 1000 ekzempleroj.
6.4 JEN/Koncize: nova redaktoro estas Stefaan Cottenier, Bozestr. 106, 8710 Kortrijk-Heule
6.5 Komuna kursotago okazos fine de septembro en Bruselo: pli da informoj sekvos. Valonaj junuloj povos aliĝi ĉe la centra adreso de JEVA, Schotlandstr. 73, 1060 Bruselo.
6.6. Ĝenerala jarkunveno: ĝi devus normale okazi dum la semajno de internacia amikeco (SIA) en Kortrijk, sed pro ĝia neokazo nia ĝenerala kunveno okazos en Antverpeno kiel kutime antaŭ la ĝenerala jarkunveno de FEL, plej laste do antaŭtagmeze la 10an de marto (se tio eblos) aŭ se SIA okazos aliloke. Invitoloj sendiĝos ĝustatempe. Decidenda estas la nova aĝlimo de 30 jaroj kun posta mencio en la Ŝtatgazeto.

Fino: 12h45. Protokolanto: Jean Pierre VandenDaele.

# KUNLABORI.

Ĉi somere mi denove rilatis kun multaj esperantistoj en diversaj lokoj kaj en diversaj cirkonstancoj. Svarmis la esprimoj kiaj: "... tiuj stultuloj ... la frenezuloj de la komitato ... la idiotoj de nia landa asocio ... li agas tiel fuŝe ... nenion bonan ŝi faris..." Diversfoje mi jam aŭdis: "Esperanto vivas malgraŭ la Esperantistoj!" Dum multaj jaroj mi larĝe kaj abunde kontribuis al tiaj cinikaj konversacioj pri la tiel nomataj eraroj de "la aliaj"; mi streĉis mian intelektan kapablon por esti originala kaj akra en la primokado de aliaj samideanoj. Ankoraŭ nun la defio restas granda por ridindigi precipe aktivulojn en la Esperanto-movado. Sed en lucidaj momentoj, la supre priskribitaj esprimoj vundas mian koron. Mi ja komprenas ke tiu ĉi sintenado lamigas nian poresperantan aktivecon sed mi ankoraŭ ne trovas eblecon por komprenigi tion al aliaj homoj. La ŝanĝiĝo okazis kiam mi legis pri - por mi - la plej grava malkovro de la moderna psikologio, nome ke nia insultado, ĉikanado, blasfemado, incitado je aliaj homoj estas nia natura metodo por obtuzigi niajn proprajn doloriĝajn sentojn, kiel timo, manko de memfido, sento de malsukceso kaj de malfeliĉo. Kiu ja kuraĝas malferme paroli pri siaj timoj, pri kvereloj en propra familio, pri problemoj en la dejoro, pri la sento ke oni

ne plu povas sekvi la rapidan disvolviĝon de nova teknologio, ke oni laboris dekojn aŭ centojn da horoj por Esperanto kaj apenaŭ ion konkretan atingis.... Esti malferma igas nun despli vundebla: ju pli amikoj scias pri niaj sinceraj sentoj despli akre ili povas vundi kaj ĉagreni nin. Sed finfine mi komprenis ke ne estas alia ebleco ol riski tion, se ni volas akiri la efikon de sinergio, kiu ĝis nun tiom mankis en la Esperanto-movado. Per sinergio, mi volas esprimi la fenomenon ke 2, 3, 4 ... homoj kune povas akiri multe pli ol 2, 3, 4 ...individuemaj homoj. Ju pli kohera estas la grupo, despli granda la efiko de agado. La bazo de efika laboro do estas la respekto por aliaj kunlaborantoj. Tial mi firme intencas pli atente aŭskulti homojn, kiuj rakontas pri novaj planoj aŭ pri faritaj iniciatoj. Mi firme intencas honeste diri mian NEkonsenton laŭbezone. Sed tie mi terure stumblas: mi komprenas ke rompiĝo de kontakto kun homo, kiu sentas sin ofendita ankaŭ ne kondukas al kunlaboro. Kaj kiel komprenigi malkonsenton sen ofendi. Tro ofte mi ankoraŭ silentas ĉar mi ne vidas klaran eliron el tiu ĉi situacio. Eble alia leganto baraktas kun simila sento de senpoveco. Tiu ĉi artikolo estas invito por interŝanĝi ideojn kaj spertojn ĉi-rilate.

Ivo Durwael.

# Dua studotago por Esperanto-instruistoj/antoj sabaton, la 10an de feb. 1990

---

## Temo: instruado en la praktiko

---

| | |
|---|---|
| 10.00-11.20 | La metodo Dennis Keefe (1)<br>Gvidos Alex Humet, kiu instruos kiel uzi tiun efikan sistemon. Ni lernos en grupoj. |
| 11.40-13.00 | La metodo Dennis Keefe (2) |
| 13.00-14.00 | Pano surloke (120 fr.) |
| 14.00-16.00 | La metodo Petro de Smedt<br>Li mem klarigos al ni la bazon de sia instruado. |
| 16.00-17.00 | Evaluado de la tago en malgrandaj grupoj. |
| 17.00-17.05 | Foriro. |

---

## Aliĝilo

Nomo: ......................................................................................

Adreso: ..........................................................................................

..............................................................................................................

Telefonnumero: (........) ........ ........ ........

JES! Mi partoprenos en la studotago.

Mi sendas mian aliĝilon al Alex Humet, van Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem, telefono 03 239 21 69.